

Esperanto-Brno

Esperanto-Brno - Kluba prelego 19.9.2007

Vojaĝo al Ukrainio

Miroslav Hruška

Ukrainio 2007 - celoj, planoj de vojaĝo

Partoprenintoj - el Ĉeĥio: Blahuš Marek, Břicháček Tomáš, Hruška, Miroslav, Rydlo Karol - el Slovakio Procházka Juraj, Repiský Andrej

Konjektita longo: 22.6. – 7.7. (2 semajnoj)

Celo: viziti Krimeon, Kievon, eventuale Ĉernobilon.

Plano de vojaĝo: Prago (Tomáš) -> Brno (mi, Karol kaj Marek) -> Košice. El Brno forveturo per buslinio Student Agency Prago -> Brno -> Košice. Alveturo al Košice je 18.00, je 18:20 forveturo al Vyšné Nemecké, piede trans limoj al Uĵgorod, poste per trajno al Simferopol je 0:30 de la mezeŭropa tempo.

Proksimume 5 horojn ripozo en Lvov, alie nur mallonga haltado de rapidtrajno, kiu veturas 38 horojn. Poste proksimume 2,5 horojn per trolebuso en Jalton. Semajno en Krimeo, poste kun Saša en Kievon. Tie unu semajno kaj poste hejmen.

Estis Silvestro 2006 kaj mi kun miaj du amikoj (Marek kaj Karol) el Ĉeĥio partoprenis neforgeseblan esperantan aranĝon "Ago semajno" en Pollando en Nowy Sącz. Dum la semajno ni konatiĝis kun Saša el Jalto en Ukrainio. Jam dum la aranĝo ni interkonsentiĝis kun ŝi, ke ni vizitos ŝin somere. Post la reveno komenciĝis malrapide, sed nepre planado de vojaĝo. Iompostiome aliĝis du niaj amikoj el Slovakio (Andrej kaj Juraj) kaj unu el Prago (Tomáš). Celo estis: Krimeo kaj poste unu semajno trajne en Kievon.

Nia vojaĝo al Krimeo

22-a de junio – vendredo

La tago de forveturo estis fiksita je la 22-a de junio je la deka horo el Brno. Por ke nia vojaĝo estu senproblema, ni elserĉis en interreto ĉion gravan. Paŭlo el Snina (orienta Slovakio), kiu ankaŭ volis veturi kun ni, aĉetis persone post la landlimo en Uĵgorod biletojn por trajno veturanta en krimean Simferopolon.

Finfine estis venis la tago de forveturo kaj ni povis forveturi. Je le deka horo kaj

tridek minutoj ni forveturis per buso de Student Agency el Brno en Košice. La vojaĝo estis trankvila kaj agrabla, sed bedaŭrinde, la buso malfruiĝis. La malfruiĝon ni jam ne sukcesis likvidi, male ĝi ankoraŭ kreskis ĉe la ĉeĥa-slovaka landlimo. En Košice ni devis esti je la dekoka horo - ne okazis, do ni ne povis enbusiĝi je la dekoka horo kaj dudek minutoj al limzona vilaĝo. Andrej kaj Juraj ne havis tiun problemon, ĉar ili veturis al Uĵgorod sendepende de ni.

Por solvi nian problemon, Karol telefone vokis sian kuzon el Košice, kun kiu li interkonsentiĝis, ke li venos je la dudekunua horo en Košice kaj li iros kun ni en Uĵgorod. Je la naŭa horo vespere ni enaŭtigis niajn dorsosakojn kaj ni ekvojaĝis trans Michalovce al landlimo.

Intertempe ni ricevis somoson de Andrej kaj Juraj, ke ili devis petveturi trans la limo, ĉar ili ne povis iri piede (ne estis al ili permesite transiri la landlimon piede), sed ili jam estas en Ukrainio.

Slovakaj doganistoj ne kontrolis nin longe kaj la formalajoj pasis rapide. Sed laŭ kvanto de aŭtoj antaŭ la ukraina doganejo kaj ilia ŝoviĝado iom-post-iom ni antaŭsentis, ke ni devos longe atendi. Kaj konsidere, ke nia trajno foriris je la unua horo kaj tridek minutoj de nia tempo, ni jam ne havis sufiĉe da tempo, ke ni pacience atendu, ĝis venos nia vico. Do, Marek, Karol kaj la kuzo iris al doganistoj kaj post iom longa klarigo ili finfine tamen venis al la aŭto, ĉar ili elpetis prioritatan alvenon al kontrolo. Ni ricevis kartetojn por emmigrontoj kaj ni rapide plenigis ilin. Post respondo de rutina demando pri alkoholo kaj drogoj (kiu tirus tion en Ukrainion?) ni jam povis rapide kaj frue ricevi pasporton kaj ni veturi daŭre! Sed tempo mallongiĝas...

En Ukrainio

Ĉar neniu el ni orientiĝas en Uĵgorod kaj laŭ origina proponita pieda vojaĝo estas malsencoplenta trovi la trajnstacion, ni jam ŝanĝas rande de la urbo la plej proksiman taksion kaj rapide dum pluvo ni transkargas niajn dorsosakojn. Tio okazis tiel rapide, ke ni eĉ ne atingis diri adiaŭ kun kuzo de Karol, kiel ni urĝiĝis! Taksiŝoforo konis bone la vojaĝon, do li forveturigis nin al trajnstacio rapide kaj senprobleme. Ni pagas en transkalkulo 80 kronojn kaj tuj kuras al perono. Tie ni jam renkontiĝas ĝoje kun Andrej kaj Juraj antaŭ trajno sur unua trako kaj senprokraste ni entrajniĝas! Ni kaptis trajnon!

Je la unua horo kaj tridek minutoj ni foveturas al Lvov kaj Simferopol. En kupeo ni estas dividitaj po duope - kuŝejoj en supra parto - kaj sub ni veturas fremdaj homoj. Mi kun Tomáš ne atendis ilin tiel frue dum nokto, sed tamen Marek devis vekti nin, ke ni malŝlosu nian kupeon. La dorsosakojn ni kusiĝis en spacon super la koridoro kaj ni finfine povas malrapide ekdormi. Ĝi estas stranga impresio.



Kupeo kun litoj - foto Tomáš

23-a de junio – sabato

Ĉirkaŭ la oka ni estas antaŭ Lvovo. La kondukto proponas teon, la geedzoj matenmanĝas, Tomáš aĉetas vaflojn Artek. Komencas trajntransligado, kiu daŭros 5 horojn. Je la dekunua horo ni ekiris en la urbon direkte de la katedralo (orienta punkto), dokumentojn kaj monon ni kunportas, la ceteron gardas por ni la edzino. Laŭ la ĉefa avenuo ekde la vokzalo ni vidis irantajn marŝrutkojn kaj malnovajn tramojn. Ni ĝispiediris la katedralon, pormomente eniris ĝin kaj daŭrigis preter la „finhaltejo“ de tramoj kaj trolebusoj. Kvankam ni faris etan rondpromenon, krom unu vrakon ni tamen apenaŭ ion alian indan vidis. Sed aventuro alvenis tute hazarde: la ŝoforoj e ekskursita tramo senpage veturigis nin al la stacidomo! En la tramo ni fotiĝis. Ĉe la stacidomo ni ŝanĝis monon kaj aĉetis bildojn pri Lvovo. Poste rekaptis nin unu el la homoj de la tramo kaj skribis por ni sian retroŝtan adreson, por ke ni sendu al li la foton. Ŝajnas, ke ĉeĥoj ne vizitas Lvovon ofte! Poste ni ekiris al la „bazaro“ – surstrata. Oni vendis tie vivantajn kokidetojn – sur la strato – simple tiel! En skatolo. Revenante ni fotis unu novan trolebuson, kiu tamen estas verŝajne la sola tian en Lvovo, ĉu eble?



Nia grupo en tramo - foto ŝoforo - fotilo de Karol

De maldekstre: Juraj, Tomáš, Miropiro, Karol, Marek kaj Andrej

Ĉefa



trajnstacio en Lvov



Vivantaj kokidetoj en skatolo - foto Karol

Post longa ŝovado de la trajnoj (5 horoj) ni finfine je 13:52 ekveturis plu, direkto Simferopolo. Restas 25 horoj de la originaj 38. Ĉirkaŭ la sepa kaj duono mi kun Juraj kaj Andrej surbaze de rekomendo de Marek iris en la manĝovagonon, kie ni havis bieron. Ni ankaŭ rigardetis en vagonon – lokkartan. Vespere dum iom da tempo ludis vortpiedpilkon. Post la dekonua ni enlitiĝis. Mi dormis pli bone ol dum la antaŭa nokto.



Nia trajno estis longa... - foto Karol

24-a de junio – dimanĉo

Post oka kaj duono matene ni aĉetas denove teon kaj matenmanĝas. Laŭ la mapo kaj horaro, kiun la ukrainiaj fervoroj sukcesas sekvi kaj observas (malkiel la Ĉeĥa fervojo) ni tagmeze estos en Krimeo, je la tria siavice en Simferopolo. Hieraŭ mi ricevis de la edzoj sub ni ion por gustumi, rekompence mi donacas al ilin sudokon (sed sen aparta sukceso). Ni transveturis per ponto Dnepron. Ĉirkaŭ tagmezo ni iris havi braĉon kaj bieron, kiam ĝuste ni haltis en Dĵankoj (rim.: unu etapon ni veturis tirataj de motora lokomotivo), kion akompanas populara popola muziko. Post 38 horoj ni baldaŭ post la tria horo posttagmeza alvenis Simferopolon. Ni pakis ĉion, kion ni estis elprenintaj el la dorsosako. Ni pridonacis la edzojn per DVD pri Prago kaj du Diskitoj kaj Tatranoj. Je 15.35 ni forveturis per trolebuso al Massandra (10 hrivoj). La vojaĝo per tiu trolebuso ne estas tamen neniel kapturna, post la sesa horo ni eliĝis kaj bonveniĝis kun Saŝa kaj du pliaj esperantistoj, Magnus el Svedio kaj Aron el Hungario. Bonvenigado preskaŭ ne finiĝas - tiom feliĉaj ni estas, ke nia

vojaĝo jam estas post ni. Estas nekredeble, sed post ses monatoj ni renkontiĝis kun ŝi! Ni alvenis en la tranoktejon, kiu laŭis Ukrainion ;-) Post tio ni startis per trolebuso en Jalton. Ni iom promenis preter la maro kaj poste ekrevenis. Kondiĉe ke oni tion povas nomi tranoktejo, ĉar ĝi estas terura konstruaĵo. Sed grava estas, ke ni povas dormi ie :)



Ĉefa trajna stacio en Simferopol - foto Marek



Trolebuso en finstacio en Simferopol en direkto al Jalto - foto Tomáš



Trolebushaltejo en Massandra - foto Karol

Vespere ni renkotiĝas kun verŝajne la plej grava esperantisto en Jalto, Jefim. Kvankam li estas jam ne juna, li estas tre aktiva. Iomete ni konatiĝis kun Jalto, tradicia somerrestadejo de Rusoj (cetere oni parolas pli ruse ol ukraine en Krimeo).
Krimeo

25-a de junio – lundo

Matene ni atendis la alvenon de Saŝa. Poste atendis nin mallonga transloĝiĝado. Poste jam nenio plu malhelpis nian starton al la Levadia palaco, nome la palaco de la jalta konferenco. Kaj poste ankaŭ al la plaĝo. La maro mojosas:-) Poste ni iris al Jefim kaj al „market“, nome bazaro. Denove uzinte trolebusojn ni iris al tranoktejo.



Levadia palaco - foto Tomáš

26-a de junio – mardo

Matene ni ekis al la aŭtobusa stacidomo kaj per antaŭmendita marŝrutko veturis al unu preĝejo kaj poste al Baĥĉisarajo, kie ni vidis la tataran kulturon (kaj ankaŭ manĝis la tipan tataran manĝaĵon ĉeburekoj). Survoje ni haltis ankoraŭ ĉe iu belvidejo (trans la valo rokurbo Tepekermen, kiun esploradis esperanto-pioniro Borovko) kaj en Balaklavo (haveno) kaj poste jam iris en Jalton. Ni vizitis hejmon de Jefim, poste rapide ŝanĝis monon kaj iris en picejon. Ni bone manĝis kaj poste ekis trans la plaĝon kaj market-on al Jefim. Ĉe li ni elŝutis la fotojn.

27-a de junio – merkredo

La mateno ne bonvenigis nin aparte sune, sed tamen ni kalkulis kun eskurso en montaron. Je la deka ni renkontiĝis kun Saŝa kaj iris en la vendejon de operatoro life:) kaj aĉetis antaŭpagitajn kartojn. Kadre de speciala kampanjo ni povas ene de la reto life:) voki unu la alian senpage. Ilian kuponon jam havis ekde hieraŭ aŭ kiam Marek, nun havas ĝin ankaŭ mi, Karol kaj Magnus. Poste Saŝa kontraŭ kvin hrivnoj aktivigis por ni malmultekostan telefonadon eksterlanden. Minuto kostas hrivnon, somoso 50 kopejkojn:) Poste ni iris aĉeti biletojn por trajno. Kvankam lokkarto malallogadis nin kaj ni antaŭe ne kalkulis kun ĝi, deziris per ĝi veturi Saŝa, Karol, Magnus kaj Andrej. Fine tamen ne restis alia eblo ol lokkarto por ĉiuj. Kupeoj jam estis forvenditaj. Saŝa iris aranĝi ion privatan, tial ni iris en poŝtoŝtacion, forsendis poŝtkartojn (la poŝtmarkoj ne havas monvaloron surskribitan, nur iajn literojn!), poste ni iris manĝi al Mac. Denove mirakle realiĝis al ni Andrej kaj ni mallonge vizitis retkafejon, kie mi rapide prizorgis mian retroŝton. La kafejo havas tian avantaĝon, ke oni parte redonas monon por neforuzita tempo! Poste ni iom plu veturis per trolebuso ĝis la aŭtobusa stacidomo, kie jam atendis nin Saŝa kaj Magnus. Tien baldaŭ alvenis ankaŭ Olga kun Natálka (mi konis ilin de Ago-Semajno ankaŭ)! Bedaŭrinde tio estis la unua kaj la lasta fojo, kiam mi tiujn ĉi afablajn fraŭlinojn en Jalto renkontis. Poste ni jam startis per marŝrutko en la montaron, rigardis ŝtonan akvofalon (akvo mankis kaj plendinte pri tio ĉe la kasejo oni atentigis nin pri la ruslingva anonco sur la pordego, kvankam oni de ni antaŭe kiel de eksterlandanoj kolektis enipagojn) kaj poste sub gvidado de Saŝa komencis montaran promenon laŭ la Botkin-pado. Survoje ni dufoje estis trafitaj de pluvo, ni renkontis kaprojn al kiuj bongustis ŝeloj de bananoj. Poste ni vidis sur monto krucon kun fulmokonduktilo kaj poste jam rapide komencis descendi. Ni atingis la aŭtobusan stacidomon de Jalto kaj piediris en la picejon. Survoje Marek aĉetis kolbason – solan kolbason en saketo! Ni eĉ malkovris iun relative grandan vendejon, kie mi aĉetis iujn dolĉaĵojn kaj konusforman dezerton, kiu evidentiĝis tre bongusta. Tiam ni jam alvenis la picejon. Tuj elirinte, ni komencis spekti la marondojn. Ĉar jam estis iom tro malfrue por viziti Jefimon, ni iris rekte al marŝrutko kaj per ĝi hejmen.



Kaproj en montaro - foto Tomáš

28-a de junio – ĵaŭdo

Matene ni relative longe tenadis nin dormantaj. Kun Tomáš mi vizitis vendejon, kun Karol ankoraŭ la trolebushaltejon Massandra, revenante ni iom misvojis, sed la konatiĝo kun la loka loĝnivelo estis vere interesa. Nur post la tagmezo ni foriris al la aŭtobusa stacidomo, kie nin pro miskompreniĝo tamen atendis neniu. Sekve ni havis pli leĝeran programon. Áron kaj la ceteraj iris al la plaĝo, mi kaj Tomáš, nefascinataj tiom per plaĝoj, preferis veturi al Alupka. El Alupka ni iris al la palaco, kie onidire iu volis en la naŭdekaj jaroj okazigis puĉon. De ĝi ni denove veturis per marŝrutko al la Hirunda nesto. La vojon post la elmarŝrutkiĝo ni klopodis unue trovi mem, sed ni ne sukcesis. Iasenca plibuntigo kaj samtempa helpo fariĝis por ni pola gvidisto, kiun ni per nia ĉeesto ĝojigis kaj kiu volonte helpis al ni. La neston ni kontraŭ tri hrivnoj deekstere spektis (interne itala restoracio por riĉuloj) kaj sekvante la konsilojn de Karol ni iris per marŝrutko al la Levadia palaco kaj de tie per relative longa piediro atingis la ceteron de la grupo. Sur la plaĝo estis relative multaj homoj, sed pro la ondoj malmultaj banis. Poste mi iom malproksimiĝis de la maro, ĉar ĝi estis relative brua, telefonvokis al Saša kaj interkonsentis kun ŝi pri renkontiĝo apud la statuo de Ĉeĥov, kiun mi dum la telefonado rapide malkovris. La proponata kampanjo de life:) allogadis kaj tial mi alvokis la panjon, bondeziris al ŝi okaze de naskiĝtago kaj lasis Saša dum momento paroli ruse kun la panjo. Panjo estis ĝuste tiam en bestokuracistejo, kompreneble estis surprizita de tio, kiu vokas ŝin, kia nekonata numero, sed tamen bone, ke tia kampanjo ekzistis:) Saša alvenis kun Magnus, do ni iris al la plaĝo, kie ni tamen jam ne plu pasigis tro longan tempon kaj baldaŭ foriris por uzi interreton. Bedaŭrinde mi ne sukcesis ekfunkciigi icq:(Sed cetere ĝi estis relative malmultekosta kaj rapida (la retkonekto). Vespere ni ankoraŭ renkontiĝis kun Jefim. Ni iom promenis kaj poste veturigis nin hejmen al Massandra juna ukrainino

Maŝa kun sia patro, kiu laboras kiel ŝoforo de marŝrutko. Nur Karol ankoraŭ malfruiĝis retumante, sekve li devis alveni memstare. Sed li sukcesis tion.



Hirunda nesto - foto Tomáš

29-a de junio – vendredo

Kaj jam la tempo malmultiĝas. Matene mi iris en vendejon, aĉetis kolaon kaj bulkojn. Je la deka ni havis renkontiĝon kun Jefim ĉe la trolebusoj. Per trolebuso ni pluiris ĝis Nikita. Veturis kun ni ankaŭ Maŝa, 13-jaraĝa ukrainino, kiu lernas la ĉeĥan kaj ŝajnas multe pli jaraĝa. En Nikita ni vizitis la botanikan ĝardenon per „jefima maniero“. Jefim ĉiam kaŝe aŭskultis gvidanton de paginta grupo de vizitantoj kaj poste iom flanke ĉion tradukis en esperanton. Ankaŭ hodiaŭ ne mankis vizito de plaĝo. Sed la maro dume ne trankviliĝis. Rekompence ni havis la okazon angle babili kun Daniel el Moldavio. Kiam ni jam havis sufiĉe, ni reekiris en la centron. Jefim venigis nin en du lokajn manĝejojn, kiujn li verŝajne fojfoje vizitas. Mi havis braĉon

kaj gulaŝon. Ne aparte bona. Poste li foriris, lasis nin manĝi. Ni satmanĝis, survoje al lia domo aĉetis melonon kaj poste ĉe li formanĝis ĝin. Post la satiĝo ni ekmarŝis al ia teatrejo, kie estis okazonta leciono de esperanto. Tiu vere okazis, tamen ne tro efike kaj ankoraŭ ni antaŭ ĝi faradis iujn mienajn ekzercojn kaj dancis valcon. Fine de la instruado ni prezentiĝis. Orgenan koncerton kontraŭ pago en preĝejo ni rifuzis kaj anstataŭe iris al Mac. Tie estis sufiĉe multaj homoj, sed post momento alparolis nin unu fraŭlino kun minikomputilo kaj registris nian mendon. Mi kun Karol havis Big MAC, la ceteraj fritojn. Poste alvenis Saŝa kaj kune kun Gulĝan gvidis nin tra malnovaj stratetoj de Jalto. Stranga maniero por amuziĝi, ni nenion sukcesis aranĝi kaj krom bela vido al la plena luno kaj la maro (nu tamen, ni ne estu tiom tro kritikaj, ĝi estis bela vido) kaj klaĉado de Karol kun Saŝa en la ĉeĥa ni nenion specialan travivis. Poste ni rehejmiĝis per marŝrutko numero tri. Kun Marek ni apudsidis la ŝoforon, Karol kaj Tomáš sidis malantaŭe (la slovakoj foriris jam pli frue). Tiuj du rapide amikiĝis kun ebrietigintaj geukrainoj kaj ĉe la antaŭlasta haltejo kun ili eliris kaj iris trinki bieron. Mi intereson ne montris, tial mi povis ĝui privatan veturon nur kun Marek kaj la ŝoforo ĝis la finhaltejo.



Loka trolebuso - foto Marek

30-a de junio – sabato

Matene ni iomete pli longe dormis, denove ion aĉetis en la vendejo, Marek jam delonge en la urbo enrete finverkas eseon por ricevi studkontrolon el la germana. Ĉirkaŭ tagmezo ni ekpromenis al la palaco en Massandra, kie ni denove renkontis Daniel, kaj poste jam rekte en la urbon. Sur la kajo aperis standoj de elektitaj landoj de EU, tamen ne de Ĉeĥio, tial ni kolektis prezentilojn, flugfoliojn. Interalie mi prenis ĉeĥlingvan tekston pri studado de la angla en Irlando kaj mapon de Slovenio. Vespermanĝi ni iris denove en la picejon. Marek ankoraŭ eniris interreton, Karol

aĉetis en librovendejo mapon de suda parto de Krimeo. Karol, Magnus kaj Saša interesiĝis pri la koncertoj, tial ni lasis ilin tie kaj iris adiaŭi kun Jefim. Mi denove alvokis la gepatrojn. Artfajraĵon ni ne vidis, sed onidire ĝi estis bela. En la ĉambro ni komencis pakadon.



La statuo de Lenin - foto Karol



*Komuna foto ĉe Lenin :-)- foto Saša - fotilo de Tomáš
De maldekstre: Juraj, Andrej, Karol, Magnuss, Marek, Tomáš kaj Miropiro*

1-a de julio – dimanĉo

Matene ni pakis ĉion ceteran. Ni veturis malsupren al vokzal, fotis la trolebuson kaj kontraŭ 15 hrivnoj forveturis per marŝrutko al Simferopolo. Temis pri multe pli rapida veturo kaj necesas aldoni, ke ankaŭ pli interesa. La ŝoforo veturis en tria, „meza“ leno. Marek iris kun Saŝa priesplori pri la vetureblecoj al Ĝankojo, intertempe ni ankoraŭ aĉetis bananojn kaj iujn bakaĵojn, kontrolis nin polico. Andrejon oni porcerte forkondukis iom apuden al stacio, verŝajne pro suspekto pri posedado de narkotikaĵoj. Al Ĝankojo ni iris kontraŭ 20 hrivnoj. Tie ni relative rapide eksciis, ke ĝuste estis foriranta nia aŭtobuso al Bohemka, alinome Lobanovo, tre eble la ununura tia en tiu tago. En Bohemka ni vizitis ĉeĥan centron kaj klasĉambron, kie infanoj lernas la ĉeĥan lingvon, minimuzeon, tombejon. Aldone ni trarigardis ankaŭ publikaĵon „Ĉeĥoj en Krimeo“. Ni pridonacis la 2 tieajn ĉeĥinojn, pliaĝan sinjorinon kaj ŝian filinon, kiuj pasigis kun ni ĉirkaŭ du horojn babilante. Reen ni iris per gasepelita aŭtobuso, vere tre malnova. Veturo tien kaj reen 5 hrivnoj. En Ĝankojo ni ankoraŭ havis sufiĉe da tempo por viziti iun vendejon. Ni sukcesis trovi minimarketon (Krimea strato, poste Kalinin-strato), kie ni aĉetis „Baton“ (bastonforma dolĉaĵo), bongustaĵon konatan de la trajno kaj poste ni revenis.

La renkontiĝo estis tre riĉiga, fruktodona, ĉar ni estis de lokaj homoj varme bonvenigitaj kaj ni povis trarigardi la libron "Ĉeĥoj en Krimeo", sed eĉ ĉeĥan lernejan klasĉambron, lokan muzeeton kaj tombejon, kaj tiel ni inter tiuj ĉeĥaj vortoj kaj nomoj sentis nin preskaŭ kiel en Ĉeĥio - kvankam la loĝantoj de Bohemka kaj iliaj familioj loĝas en ĉi tiu vilaĝo pli ol 140 jarojn (fakte, Bohemka estis sola vilaĝo, kie ni estis).



Trolebusoj en finstacio en Jalto - foto Marek



*Nia grupo antaŭ foriro - foto Marek
De maldekstre: Miropiro, Tomáš, Andrej, Karol kaj Juraj*



Jes, tio estas trolebusoj faritaj de Škoda:-) - foto Marek




*Nia grupo en Lobanovo - Bohemka - foto Karol
De maldekstre: Miropiro, Magnuss, Saša, Andrej, Juraj, Marek kaj Tomáš*



Antaŭ enirejo de la ĉeĥa centro en Bohemka - foto Tomáš



Čeň - kultura etnografia centro "Bohemija" - foto Tomáš



Ni trarigardis ĉi tiun interesan libron - foto Karol



*Ĉiu kiel li volas. Tio estas normala ne nur pri balkonoj. Kaj ne nur en Ĝankojo ... -
foto Tomáš*

Kvankam tio ŝajnas nekredebla, ni pasigis semajnon en Krimeo kaj hodiaŭ, je 20:53 ni forveturis per trajno al Kievo, ĉi-foje ne en kupeo, sed lokkarte. Ni okupis du sekciojn (kunveturis ankaŭ Saŝa kaj Magnus) kaj baldaŭ ekdormis. Matene ni aĉetis teon kaj matenmanĝis. Je la dua horo posttagmeze ni atingis Kievon!



Plackarta - foto Tomáš

Kievo

La vizito de Kievo

2-a de julio – lundo

Nia vojaĝo eniris sian duan duonon.

Ni eliris eksteren, antaŭ la stacidomon. Antaŭ ni trolebusoj, maldekstre metroo (stancija Vokzalna), dekstre picejo Celentano. Oni decidis tuj aĉeti biletojn por kupeoj, kompreneble kaze ke ili el Kievo al Uĵhorodo ankoraŭ haveblos. Ni kunmetis la monon. Alveturis ankaŭ Jirka Galuška, per aŭtobuso el Brno. Certe ne komforta vojaĝo, sed eble pli malmultekosta. Saŝa sukcesis kun Marek ekhavi biletojn por kupeoj! Kvankam temos eble pri iom aliaj kupeoj ol kiel estis al Simferopolo. Karol eksciis, ke li ne havas monon en sia bankokonto. Poste ni eniris la metroon, aĉetis ĵetonojn kaj veturis laŭ la rulŝtuparo tre profunden suben. Kun unu ŝanĝo ni atingis la „Amikecon de nacioj“, de kie ni iom piediris al la esperantistoj. Ĉe ili oni post teama interkonsultiĝo decidis pri tio, kiu dormos ĉe kiu. Nur Karol restis en la urbo kun Saŝa kaj Magnus, ni ceteraj ekveturis per marŝrutko al la stacio Arzenalnaja (ĝuste tie estis okazanta armea parado aŭ io tia), kie ni renkontiĝis kun Oksana. Poste ni subeniris en ankoraŭ multe pli profundan stacion de metroo. Denove kun ŝanĝo en unu stacio ni atingis la stacion de la „Herooj de Dnepro“. Per aŭtobuso ni tiam forveturis al Lebedivka, kie ni konatiĝis kun la gepatroj de Oksana, vespermanĝis, babilis kaj poste ankoraŭ promenis al la kieva akvobaraĵo, telefonvokis al Aleksander el Kievo (kiu nun loĝas en Brno kaj iom asistis al ni pri preparado de la vojaĝo) kaj revenis.

3-a de julio – mardo

Matene ni matenmanĝis, je la oka (aŭ fakte baldaŭ post ĝi) ni forveturis per aŭtobuso al la Herooj de Dnepro. Daŭrigis ni per la metroo. Ĉe Mejdan Nezaleĵnosti ni elmetroiĝis kaj komencis admiru la belegan kievan centran placon. Ni komencis promenon laŭ la bulvaroj, admirante la belaĵojn de Kievo. Denove ni vidis Leninon, plie ortodoksan preĝejon, operon, ministerion de eksterlandaj aferoj (grandegaj flagoj de EU kaj Ukrainio), trairis mallarĝan strateton, renkontiĝis jam duafoje kun Saŝa, Karol kaj Magnus, kiuj hodiaŭ vere tute ne zorgis pri la tempo. Mi, Tom, Karol kaj Marek iris tagmanĝi, al Mek-o, kiu estis pli malmultekosta ol en Jalto. Mi havis double ĉiz-on kaj McFlurry kun fragoj kaj ĉokolado. Plu atendis nin promeno al la stadiono de Dinamo Kievo, apud la stadiono ni trovis agrablan belvidejon, fontanon, en kiun mi denove eniris kaj ĝuis la agrablecon de la akvo. Ni daŭrigis jam denove direkte al la placo de Sendependenco, tra la Bank-strato, kie loĝas la prezidento de Ukrainio, plu per stratejo jam al la metroo. Kaj hu ra hejmen! Hejme mi pretigis por mi supon, lavis poste post mi la teleron:) Kaj ankaŭ subpantalonojn ;-)



La placo de sendependeco (Majdan Nezaležnosti) - foto Tomáš



Alia rigardo al la placo de sendependeco - foto Tomáš



Preĝejo de sankta Sofio - foto Marek



Kievo - urbo kun multe da kontrastoj - petanta hundo - foto Karol



Departemento de eksterlandaj aferoj - foto Karol



Opero - foto Tomáš



Ora pordego - foto Marek



*Ĉeĥa parto de nia ekspedicio proksime al ia monumento de ia venko - foto Karol
De maldekstre Tomáš, Marek, Miropiro kaj Karol*



Rezidejo de la prezidento en strato Bankova - foto Marek

4-a de julio – merkredo

Matene denove veturo al Kievo. Ŝanĝo direkte al Arzenalnaja. Ni eliris direkte al Lavra, vizitis tiean ortodoksan arealon de temploj, precipe la „grotojn“. Per piede ni direktis la Palacon de Ukrainion, sed ne eniris tiun. Ĉe Arzenalnaja ni sekve renkontis Julija, fraŭlinon el Poltavo, kaj ŝian koramikon. Ni ekis al restoracio, post la tagmanĝo ni sekve „frue“ renkontiĝis kun Saŝa kaj Karol. Ni veturis per metroo al Hidroparko, insulo en la rivero Dnepro. Bela panoramo, sed baldaŭ komencis pluvi, tial ni iris reen. Mi ricevis senpagan kajeron de Vespera Kievo. En la urbo iris Marek kaj la ceteraj pagi la Ĉernobilon, mi iris kun Jirka al Petrivka, kun espero, ke tie estos librovendejo kaj bona elekteblo. Ne estis tamen, do ni pluiris al la buso. Survoje Jirka ekbabilis kun unu ukraino, poste ni perdis iom da tempo reciproke serĉante nin kaj

iris rapide al la buso. Tiun ni kaptis, sed Marek kaj la ceteraj jam ne. Andrej jam estis hejme. La buso foriris verŝajne iom pli frue, kiam la ŝoforo rimarkis, ke estis neniu plia enbusiĝemulo en la haltejo. Marek laŭdire alvenis tien je 19:30 kiam estis nenio plu. Ni ekkomunikis per poŝtelefonoj, sed ili tamen ekis el Viŝhorodo perpiede. Nur poste ili kaptis iun marŝrutkon. La tuto rezultigis eĉ plifavorpreze. Petr Palivoda eĉ jam serĉadis aŭton por ili. Hejme mi duŝiĝis.



Avenuo en Kievo - foto Marek



Palaco de Ukrainio - foto Tomáš

La vizito de Ĉernobilo

6-a de julio – vendredo

Denove ni vekigis antaŭ la sepa. Ni finpakis tion, kion ni ne pakis jam antaŭe, matenmanĝis kaj adiaŭigis kun sinjorino Palivoda. La aŭtobuso alvenis pli frue ol ĉiam ajn antaŭe, eble ĉar alvenis buso alia kaj stirata ankaŭ de alia ŝoforo. Per metroo ni veturis ĝis la stacidomo (krom Jirka, Andrej kaj Juraj), kie ni deponis kontraŭ 8 hrivnoj siajn pezajn valizojn. Poste ni vizitis vendejon, malkovris librovendejon, aĉetis poŝtkartojn, mi mapon de Krimeo, sur la placo de Sendependeco renkontiĝis kun Julija kaj ŝia koramiko, vizitis aĉetcentrejon Globus kaj ĝenerale la aĉetgalerion sub Mejdan. Ni rimarkis ankaŭ terglobon kie estis indikitaj la distancoj de diversaj urboj (inkl. de Prago). La aĉetgalerio estas ja bela, sed sufiĉe komplika. Alvenis Saŝa, Magnus kaj Karol, ni tagmanĝis (mi kaj Tomáš) (al Celentano, kiel oni origine planis, ni jam ne iris) kaj poste iris per metroo en la stacidomon. Saŝa estas „spirita“ fratino de Karol:-) En la stacidomo ni kunvenis pormomente ankaŭ kun Nataŝa, pri kiu Karol jam antaŭe poeziis al ni :-). Je 14:20 ni forveturis per trajno al Uĵhorodo. La adiaŭo estis trista (komprenu, post du semajnoj kun geamikoj ;-))



Rigardo ĉe elirejo ĉe kieva ĉefstacio - foto Tomáš